

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1085 (12/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Ĝis, Antonio 2
- Esperanto citato nel Dantedi 2
- 2021, la Jaro de Dante: Esperantoo-kunlaboro kun la "Casa di Dante" en Florenco 3
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 1 4
- Daŭras la laboroj por la 106-a UK, Belfasto: favorpreze aliĝu ĝis la 31-a de marto 5
- Junulara Konkurso Grabowski 5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 2 6
- Pillole di Salvezza 1085: Goethe-Faust 6

ĜIS, ANTONIO...

Redaktoroj foje havas plej malfacilan taskon: informi la legantaron pri la morto de samideano, kaj en kelkaj okazoj de amiko. Mi devas anonci la morton, pasintan 21an de marto, de unu el la plej grandaj personoj de itala kaj tutmonda movadoj: Antonio De Salvo. Paroli pri li, kaj pri lia laboro per kaj por Esperanto postulus multe pli ol tiu ĉi revueto, kie rubriko el lia blogo fermis ĉiun numeron eĉ antaŭ mia ekredaktoreco, pli ol cent numerojn for, sed kelkajn liniojn pri la amiko mi ne povas forlasi. Legante lian prezenton en Vikipedio (https://eo.wikipedia.org/wiki/Antonio_De_Salvo), oni povas supozi ke Antonio estis serioza, eĉ morna homo: male, li estis tre simpatia, sindonema kaj ĉiam preta al helpo kaj diskuto. Mi persone multon lernis el li, kaj ĝojas esti havinta la bonŝancon lin koni. En la suba foto, Antonio, la dua de dekstre, prezentanta al Papo Johano Paŭlo la Dua la misalon kaj legaĵaron de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - la aliaj du reprezentantoj de IKUE estas Miloslav Šváček kaj Duilio Magnani).



ESPERANTO CITATO NEL DANTEDÌ

Il 25 marzo si è celebrato il Dantedì, la celebrazione del settecentesimo anniversario della morte di Dante Alighieri. La RAI ha messo in onda un programma dedicato all'occasione, con la lettura, da parte di Roberto Benigni, al Quirinale, del venticinquesimo canto del Paradiso. Durante la presentazione,

la giornalista Serena Bortone, nell'elencare le lingue in cui è stata tradotta la Divina Commedia, cita anche l'esperanto: lo troverete al minuto 18'05" nel link di seguito:

<https://www.raiplay.it/video/2021/03/DANTEDI-75dcbf58-633a-4cbb-a2ba-d004a57ff70e.html>

2021, LA JARO DE DANTE: ESPERANTO-KUNLABORO KUN LA "CASA DI DANTE" EN FLORENCO

Elstaran laboron lige kun la Muzeo "Casa di Dante" en Florenco jam de pluraj jaroj faras membro de la Internacia Patrona Komitato de UEA, Giuliano Turone. Post donaco de lia Danteska Biblioteko al la muzeo, oni nun studas teknikan retan ligon ene de la muzeo inter la enhavoj de la biblioteko kaj la priskriboj, komentoj kaj ilustraĵoj en la retejo "Dante Poliglotta": <https://www.dantepoliglotta.it/?lang=eo>. La retejon eblas viziti per Esperanto aldone al la itala kaj la angla. Tiu iniciato celas profitigi la muzeajn vizitantojn (nuntempe tre malmultajn pro la pandemio), kiuj, vidante la ekspozicion de la bibliotekaj volumoj vitrine, scivolas pri ĝiaj enhavoj. Freŝa novaĵo estas la deklaro de 2021 kiel la Jaro de Dante: Italio kaj la tuta mondo honoras 700 jarojn post la forpaso de Dante Alighieri en Raveno, en septembro 1321. Por tio estis kreita en la menciita retejo gvid-pagho por la Jaro, kun foto de la florenca muzeo kaj 20 sugestoj al la muzeaj vizitantoj esplori la enhavon de la plej interesaj volumoj de la biblioteka kolekto. La gvidilon eblas rekte aliri per: <https://www.dantepoliglotta.it/la-biblioteca-di-dante-poliglotta-e-il-museo-casa-di-dante-di-firenze> - en la itala, la angla kaj en Esperanto. UEA kuraĝigas ĉiujn esperantistojn esplori la 20 proponojn de "Dante Poliglotta". Ĝis nun la retejo ricevis iom pli ol 2000 vizitojn, kiuj devenas plimulte de Italio kaj Usono. Ni ankaŭ kuraĝigas al asocioj kaj individuoj diskonigi la novaĵon: la retejo, vizitata de la tuta mondo, reklamas ne nur la "Superan Poeton" (kiu mem ne bezonus tion), sed ankaŭ la muzeon kaj paralele la lingvon Esperanto. UEA kore dankas al Giuliano Turone pro la entreprenado de tiu laboro. La verkaĵo de Dante "La Dia Komedio" estis altnivele eldonita en la serio Oriento-Okcidento, en traduko de Giovanni Peterlongo, reviziita de Clelia Conterno Guglielminetti, kun ilustraĵoj de Sandro Botticelli (Edizioni SIEI Milano, 1963, dua eldono en 1979: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=1641>), aldone al la traduko de la "Infero", fare de Kálmán Kalocsay (ĉe Literatura Mondo, 1933; represo ĉe LF-koop, kun postparolo de Gaston Waringhien, 1978: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=1695>). Estas ankaŭ traduko de Enrico Dondi, publikigita trivolume (Fonto, 2006: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7603>); la "Purgatorio" aperis unue en 2000 kaj ankaŭ akireblas aparte: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6577>. La proza verkaĵo de Dante "Vivo nova" ("Vita nova"), konsiderata la unua amromano de la itala literaturo,

aperis en dulingva eldono ankaŭ en traduko de E. Dondi en 2003:
<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7150>.

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON 1

Questa rubrica è nata con intenti scherzosi, per mostrare quali "inconvenienti" possano succedere quando ci sono lingue diverse, e traduttori non proprio professionali. Ma oggi è il 27 marzo, e nel 1977 un problema linguistico fu tra le cause della più grande tragedia del trasporto aereo commerciale. Due jumbo jet, i Boeing 747, si scontrarono sulla pista dell'aeroporto di Los Rodeos, Tenerife Nord, Isole Canarie, in una giornata di nebbia, di ritardi causati da una minaccia terroristica su un aeroporto vicino, di congestione del traffico aereo nell'aeroporto, e di incomprensioni tra un equipaggio statunitense (Pan Am), uno olandese (KLM), e un controllore spagnolo; l'errata interpretazione di una delle molte autorizzazioni che intercorrono tra la messa in moto e il decollo fece sì che il volo KLM iniziasse la corsa di decollo (circa 400 tonnellate, di cui circa la metà di carburante, spinte a 280 Km/h) mentre quello Pan Am (stesso peso) stava ancora manovrando sulla pista. Il risultato furono 583 morti nell'incendio dei due aerei. In realtà, stavano tutti parlando la stessa lingua, l'inglese, che NON è la lingua UFFICIALE del trasporto aereo (non esiste una lingua "ufficiale", ma solo consigliata), ma con tre livelli di conoscenza diversi. Purtroppo, ce ne sono stati altri, per motivi analoghi, negli anni successivi, e uno si è verificato anche nel 2010.



DAŬRAS LA LABOROJ POR LA 106-A UK, BELFASTO: FAVORPREZE ALIĜU ĜIS LA 31-A DE MARTO

La 106-a Universala Kongreso (UK) laŭplane devos okazi de la 17-a ĝis la 24-a de julio 2021 en Belfasto, Nord-Irlando, sub la temo "Paco kaj Konfido: universalaj valoroj" (uea.org/gk/920). Ni kuraĝigas interesatojn aliĝi per nia reta aliĝilo: uea.org/kongresoj/alighilo - la dua favorpreza aliĝperiodo finiĝas **la 31-an de marto**.

Kvankam la pandemio ankoraŭ postulas de ni ĉiuj plej seriozan atenton, la nuna surloka situacio daŭre ebligas la okazigon de la 106-a UK, tiel ke ĝia preparado progresas. La Estraro de UEA kune kun la Centra Oficejo restas atentaj pri la evoluoj kaj akurate informos la aliĝintojn kaj la tutan komunumon pri la sekvaj decidoj pri la UK. Frua aliĝo de interesatoj gravas por taksu nombron de partoprenontoj kaj bonorde prepari ĉion. La sekva ĝisdatigo pri la kongreso okazos plej malfrue ĝis la mezo de majo

Por doni sekurecon al la interesatoj partopreni la UK-on, la Estraro de UEA frue aprobis ke, okaze de nuligo de la kongreso, ĉiuj aliĝkotizoj por Belfasto, estos repigitaj (minus 15 EUR pro administraj kostoj; alternative aliĝintoj ankaŭ povos plene konservi sian aliĝon por unu el la du venontaj UK-oj kaj ĉiuj mendoj (kiel hoteloj kaj ekskursoj) faritaj pere de UEA aŭtomate nuliĝos; la pagitaj sumoj restos en la UEA-konto de la koncernaj kongresanoj je ilia dispo. Kongresanoj, kiuj deziras malmendi (hotelo, ekskursoj) povas fari tion ĝis la 15-a de majo.

Ĉe mendo de flugoj, aliĝintoj bone konatiĝu kun nuligo-kondiĉoj. Multaj flugkompanioj momente ofertas la eblon plene nuligi aŭ ŝanĝi flugbiletojn. Kiel ĉiam, estas rekomendata vojaĝasekuro, kun kovro de nuligo ne nur pro personaj, sed ankaŭ pro eksteraj kialoj. Atentu, ĉar ofertataj kondiĉoj tre varias de lando al lando.


La preparlaboroj por Belfasto daŭras. Ni sekvos ĉiujn postulojn de la nordirlanda kaj brita registaroj por sekura okazigo de nia jara renkontiĝo. Ĉiuj, kiuj volas subteni la laborojn por la UK, povas [donaci al la Universala Kongreso](#) aŭ [solidare aliĝi al la UK](#).

JUNULARA KONKURSO GRABOWSKI

La juĝkomisiono Grabowski anoncas specialan konkurson por gejunuloj kun la temo "La dudekaj jaroj, alia mondo?". Povas partopreni ĉiu homo, kies aĝo ne superas 25 jarojn en la 1-a de januaro 2021. Konkursaĵoj povas esti literaturaj tekstoj de ajna ĝenro (poezio, prozo, dramo, eseo, k.a.) kaj longo, neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo. La komisiono povas aljuĝi unuan premion de 250 eŭroj, duan premion de 150 eŭroj kaj ĝis tri honorajn menciojn. Ĉiu konkursanto povas partopreni per ĝis tri kontribuoj. La konkursaĵoj estu senditaj podof-formatate al la sekretario de la komisiono komisiono.grabowski@co.uea.org antaŭ la 30-a de septembro 2021.

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON 2

Per compensare quella precedente, con questa torniamo alle origini: "hanging", nell'originale inglese, sarebbe "appendere", ma anche... beh, vedete voi.



PILLOLE DI SALVEZZA 1085: GOETHE – FAUST

(tiu ĉi artikolo, el "Bitoteko", la blogo kiun prizorgis Antonio De Salvo, alvenis al mi malmultajn horoj post la informo pri lia morto: plej bona maniero memori Antonio-n estas daŭrigi lian laboron, do, kun vera plezuro, jen plia kontribuo lia)

Il 22 marzo è l'anniversario della morte (nel 1832) dello scrittore, poeta e drammaturgo tedesco Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832)

it.wikipedia.org/wiki/Johann_Wolfgang_von_Goethe

L'opera più famosa di Goethe è il dramma "Faust", composto di 12.111 versi, che influì profondamente sulla lingua e sulla letteratura tedesca, ha ispirato scrittori e artisti di tutto il mondo, e soprattutto musicisti (tra gli altri, Charles Gounod, Hector Berlioz, Arrigo Boito, Ferruccio Busoni, Richard Wagner, Franz Liszt, Gustav Mahler, Robert Schumann).

Il poema (che Goethe elaborò per 60 anni, tra il 1772 e il 1832, ed apparve integralmente postumo) racconta del Dottor Johannes Faust, che vendette l'anima al diavolo (Mefistofele) per acquistare potere nel mondo terreno, malgrado le sofferenze: una metafora della moderna rivoluzione tecnologica.

Allego:

- un francobollo della Repubblica Federale di Germania (BRD) de1979;
- un annullo postale del 15 dicembre 1982, utilizzato a Lipsia (Repubblica Democratica Tedesca – DDR) in occasione della Giornata del libro in Esperanto, con il ritratto di Goethe.

